


# La Riverego

Raporto de N. Fleury	2	Amikumu	26
Intervjuo kun N. Viau	4	MeKaRo : Trivero invitas	31
Zamenhof en Nord-Ameriko	11	Andreo Cseh	27
KEK : unua klubo en Kebeko	19	La revo de Esperanto	32
Linukseca lingvo	21	Literature	34



**Zamenhof en Nord-Ameriko kaj Montrealo !**  
**Zamenhof en Amérique du Nord et à Montréal !**



The Terrace at the Look-out, Mount Royal, Montreal, Que.



# 2017 : belega jaro por ESK !

Raporto de la eliranta prezidanto, Normand Fleury

*Compte rendu du président sortant Normand Fleury.*

Jen plia jaro. ESK fariĝas pli kaj pli maljuna asocio.

Nu, ĉu estas tempo fari ŝanĝojn, ĉar ĝi jam estas matura asocio tridekkvinjara ?

Kio okazis dum la pasinta jaro ? Silvano Auclair kaj Ĵenja Amis havis gravan rolon produktante *La RiveReton* kaj *La Riveregon*. Informi niajn membrojn kaj la tutmondan Esperanto-movadon pri niaj agadoj estas grava afero, ĉar tio pruvas, ke ESK plu funkcias, aktivas, vivas. Dank' al Nicolas Viau kaj Boris-Antoine Legault ni ankaŭ havas novan retejon !

Pasintan majon okazis sukcese MeKaRo en Hamiltono, Ontario. Niaj ontariaj amikoj denove pruvis, ke ili lertas pri ĝia preparado. Mi fieras pri tiu evento, ĉar ĝi ja estas ĝuinda semajnfino.

De kelkaj jaroj, nova evento aperis somere,

Paralela Universo. Dankon al tiuj, kiuj transprenis ĝian organizadon en Montrealo, ĉar ĝi ja fariĝas evento okazanta ĉie tra la mondo kaj estas bone, ke ankaŭ ni estas parto de ĝi.

Montrealo bonvenigis la lingvan festivalon *LangFest* ĉi-somere. Ni ŝuldas laŭdojn kaj dankojn al Nicolas, kiu brile aktivis pri tiu lingva festivalo. Ligi Esperanton kun aliaj eventoj estas ĉiam valora agado.

El la Universala Kongreso en Seulo alvenis la novaĵo pri la venontaj UK-oj, kaj plej grave por ni, pri tiu en 2020 en Montrealo. Tio estas granda defio, sed ni havas la kondiĉojn

por atingi grandan sukceson.

ARE, Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, transiris al la lertaj manoj de usonaj Esperantistoj, tiel ke



Normand Fleury, kun la diplomo pri elstara agado de UEA

nuntempe nur la usonaj samideanoj organizas ĝin. Tamen, se iu el Kebekio ŝatus kunlabori, la teamo estus feliĉa akcepti vin.

Estas ĝojige ke la klubaj kunvenoj en Montrealo allogas ofte novajn lernantojn de la lingvo. Gravas doni bonan impreson al ili pri la amikeca etoso de nia Movado.

Kiam mi parolis pri renovigo de ESK, mi celis eniron en la retan mondon. Ni jam faras tion sukcese sed ni devas daŭre flegi tion. Ni povus fari pli, organizi pli, varbi pli, sed tio ĉiam dependas de homa forto. Ek al la UK-2020 en Montrealo !

**Normando Fleury, 2017-09-29**



Vendredon la 20-an de oktobro, okazis historia renkontiĝo en Kebekurbo. Temas pri fondo de tutnova Esperanto-klubo. Partoprenis 9 personoj, loĝantoj de la kebekia regiono, kiuj malofte havas okazon uzi Esperanton. La etoso estis varma, entuziasma kaj entute... Esperanta ! La grupo celas kunveni unu fojon monate. Ĉiuj homoj, kiuj interesiĝas, bonvenas. Eblas informiĝi ĉe la Facebook-paĝo de ESK [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec), aŭ kontakti rekte la organizanton de la grupo, Suzanon la duan, ĉe roy\_248(ĉe)hotmail.com.

**Red.** : legu pri la fondo de la unua Kebeka Esperanto-klubo (KEK), en 1958, sur p. 19.



# Nicolas Viau : « Ni estu realismaj idealistoj ! »

Nicolas Viau, la nova prezidanto de ESK, respondas la demandojn de *La Riverego*.

*Nicolas Viau, nouveau président de la SQE, répond aux questions de La Riverego.*

## Saluton kaj gratulojn pro via elektiĝo !

Dankegon !

## Por la homoj, kiuj ankoraŭ ne konas vin, rakontu iomete pri vi !

Nu, mi naskiĝis en Parizo, en Francio, en 1986. Mi kreskis en tiu regiono, ĝis mi estis 14-jaraĝa kaj poste translokiĝis al Kebekio kun mia familio, en 2000. Mi loĝas en la Montreala regiono ekde tiu epoko. Mi do pasigis pli ol duonon de mia vivo ĉi tie. Mi diplomiĝis pri fiziko ĉe Universitato McGill kaj plu studis en Polytechnique (sed finfine ne diplomiĝis tie). Mi havas ankaŭ kolegidiplomon pri mastrumado de la medio kaj daŭripoveco. Profesie, mi nun laboras kiel projektestro por malgranda teknologia firmao en la fako de renovigebla energio.

Sed krom la profesia vivo mi ĉiam havis diversajn interesojn. Kiam mi estis adoleskanto, mi havis



Nicolas Viau

pasion pri kosmoesplorado (tre interesa temo), kaj pro tio mi studis sciencojn universitate. Miaj profesiemoj poste evoluis. Mi delonge interesiĝas ankaŭ pri geopolitiko kaj similaj temoj, de Eŭropo kaj Kanado aparte. Mi foje blogas (franclingve) pri ciuj ĉi temoj (<http://ideesmultiples.ca>).

Mi ankaŭ delonge havis fortan intereson pri lingvoj. Mi sufiĉe frue pli-malpli memstare lernis la anglan, studis ankaŭ la germanan en la lernejo, kaj poste eklernis la hispanan, studis la bulgaran kaj akiris bazajn konojn de diversaj lingvoj.

Paralele, mi komencis forte interesiĝi pri la stato kaj estonteco de la franca lingvo en Ameriko kaj en la mondo, kaj pri la temo de la influo de lingvoj sur la socion kaj geopolitikon. Estis, fakte, tiu zorgo, kiu konvinkis min provi eklerni Esperanton. Tio devis esti en 2009. Mi de la infanaĝo sciis pri la ekzisto de

Esperanto kaj konis bazajn faktojn pri ĝi, kaj mi scivolemis, ĉu oni vere povas facile lerni kaj paroli planlingvon (mi konstatis, ke jes !) kaj, kompreneble, allogis min la ideo de neŭtrala helplingvo por plijustigi internacian komunikadon kaj rilatojn inter nacioj. Mi do eklernis ĉefe helpe de *Kurso de Esperanto*, konciza kaj efika brazila instrua programeto, kaj mallonge poste kontaktis ESK-on.

Dum kelkaj jaroj, mi malofte partoprenis renkontiĝojn de ESK, sed ekde 2013 mi unuafoje partoprenis MeKaRon en Otavo kaj pli serioze aktiviĝis. Tiun jaron, mi partoprenis ankaŭ Someran

Esperanto-Studadon (SES) en Martin, Slovakio, mian unuan veran internacian aranĝon. Tie dum semajno mi vere fluiĝis lingve, kaj mi faris grandan malkovron : Esperantujon. Mi ŝategis la sperton, kaj mi eĉ dirus, ke ĝi estis vivŝanĝa sperto. Mi komprenis, kial oni lernas Esperanton. Mi amikiĝis kun tiom da homoj kun tiom da diversaj interesoj... Poste, tiun jaron, estis balotado por


renovigi la estraron de ESK... do mi proponis min kaj elektiĝis kiel estrarano !

### Pri kio vi zorgas nun en la estraro ?

Krom la tasko reprezenti ESK-on kaj varbi homojn en Kebekio pri Esperanto, mi aparte zorgas pri komunikado kaj anoncoj de renkontiĝoj ktp. tra sociaj retoj (Facebook, Meetup) kaj pri la retejo. Mi renovigis kaj daŭre prilaboras la retejon de ESK, kies nova versio aperis ĉi-somere.

Freŝdate, kun nia nemalhavebla redaktoro de *La Riverego*, Ĵenja Amis, mi helpis krei (kaj baldaŭ refaros) varbkalendareton laŭ la modelo de tiuj, kiujn eldonas Espéranto-Jeunes

en Francio. Kompreneble, mi ankaŭ, kune kun la ceteraj estraranoj, administras la societeton kaj partoprenas ties decidojn. Ni nun havas sufiĉe fortan kaj stabilan teamon, kaj mi aparte dankas Normandon Fleury, kiu daŭre estas estrarano (kaj kiu ankaŭ estras la LKK-on por la UK) pro lia antaŭa laboro por kreskigi la societeton kaj pro lia daŭra apogo kaj partopreno. Ni vere bezonas ĉies



spertojn kaj fortojn.

### **Kion vi ŝatus atingi dum via oficperiodo ? Kiuj estos viaj prioritatoj ?**

La finan venkon, kompreneble ! Pli serioze, nia ĉefa celo estas nun organizi la Universalan Kongreson en Montrealo en 2020. Ni havas nun grandan taskon por diskonigi Esperanton en Kebekio kaj en la tuta lando kaj kontinento. Mi do celas emfazi komunikadon celante la « eksteran mondon » (ne-Esperantistojn).

Mi ŝatus diskonigi la lingvon, kaj ankaŭ ekkonsciigi homojn pri la graveco de lingvoj en nia moderna mondo. La landoj kaj komunumoj de la nuntempo ne plu efektivas povon ĉefe milite, sed per mensa, kultura, ekonomia kaj politika influoj. Kaj neŭtrala pontolingvo montras, ke oni povas sendepende kaj egalece komuniki. Alivorte, ĝi montras, ke eblas funkcii alimaniere, apogante

lingvan diversecon. Tiu konsciigo pri lingvoj aparte gravas por Kebekio, kie ĉiam estis lingvaj demandoj. Mi pensas, ke la ekzisto mem de Esperantujo povas pensigi homojn, eĉ tiuj, kiuj ne lernas la lingvon. Esperantistoj do povas utile influi tiun diskuton pri lingvo, kulturo kaj povo, kiu estas parto de Kebekio (restante tute politike

neŭtralaj, kompreneble), kaj kontribui al publikaj debatoj.

Cetere, ESK nun organizas renkontiĝojn por lernantoj en Montrealo kaj Kebekurbo (koran dankon al Suzano Roy, kiu zorgas pri ĉio ĉi), aldone al niaj kutimaj renkontiĝoj en Montrealo. Ŝajne estas nun nova intereso pri Esperanto. Rimedoj por lerni nun abundas, sed

laŭ mi la fina celo de la lernado daŭre estas uzi Esperanton, komuniki pere de ĝi.

Danke al tio, oni povos fortigi la parolantaron kaj Movadon en Kebekio kaj pli facile allogi



Esperanto-tablo dum LangFest, 2017 (Ĵenja Amis, Nicolas Viau, Suzanne Roy, Joel Amis)



Ateliero pri Esperanto dum LangFest, 2017 (Suzanne Roy kaj Nicolas Viau)

volontulojn por la UK. Kaj ni ja bezonos sufiĉe multajn !

Mi ŝatus ankaŭ, ke oni vidu Esperanton ne kiel fiaskintan projekton, sed kiel tre interesan, unikan, kaj sukcesan aferon. Ĝi estas unika fenomeno kaj la sola planlingvo, kiu vere havas grandan parolantaron, apartan internacian kulturon, agnoskojn de Unesko kaj diversaj aliaj institucioj, renkontiĝojn, librojn, eĉ versiojn de Vikipedio, Linukso, ktp. Parolante pri Linukso, al tiuj kiuj emas uzi tiun libere disvastigeblan kaj senpagan komputilsistemon, mi ŝatas la aserton, ke Esperanto estas la Linukso de lingvoj. Kaj la fakto, ke Linukso estas uzata nur de relative malmultaj homoj ne signifas, ke ĝi ne havas valoron aŭ utilon. Ĝi donas al uzantoj unikajn

avantaĝojn, iomete kiel Esperanto.

Kaj laste, mi ŝatus instigi la kreadon de pontoj inter la Esperanto-mondo kaj aliaj intereskomunumoj, kiuj povus havi komunajn celojn, motivojn, interesojn kun Esperantistoj. Mi aparte pensas pri lingvemuloj, pri kiuj ni eble iom pli poste parolos.

**Vi estas ankaŭ parto de la LKK-teamo por UK-2020 en Montrealo. Pri kio vi okupiĝas en tiu rolo ?**

Mi estas unu el du vicprezidanto de LKK, reprezentante ESK-on (la alia vicprezidanto, Joel Amis, reprezentas KEA-on). Miaj respondecoj kongruas kun miaj celoj kiel prezidanto de ESK, ĉar mi intencas aparte zorgi pri eksteraj rilatoj (t.e. ne-

Esperantistoj). Mi helpas pri komunikado, tradukado, la retejo eble, rilatoj kun la komunikiloj, ktp.

Mi, kompreneble, kundecidos, kun la aliaj LKK-anoj pri gravaj aferoj, kiel programeroj, eventa logistiko, ktp.

**Vi estas ankaŭ tre aktiva en la organiza komitato de LangFest. Ĉu ĝi, finfine, estas, en iu senco, Esperanteca aktivaĵo ?**

Jes. [LangFest](#) estas la Montreala Lingva Festivalo. Temas pri evento, kiu okazas ĉiujare ekde 2016 (la unua eldono, tiun jaron, nomiĝis la Nordamerika Poliglota Simpozio). Ĝi estas aranĝo por ĉiuj lingvemuloj : homoj, kiu lernadas multajn lingvojn, kiuj sin vivtenas pere de lingvoj aŭ kiuj nur interesiĝas pri la temo aŭ pri lingvistiko.



Patrick Masbourian, de Radio-Canada, intervjuante Nicolas-on Viau (2015)

Estas de kelkaj jaroj nova fenomeno pri « poliglotoj » aŭ « plurlingvemuloj », kiuj ŝatas lernadi multajn lingvojn, kaj kreis retajn komunumojn kaj eventojn. Esperantistoj eble jam aŭdis pri la « Polyglot Gathering » (« Poliglota Kunveno »), kiu estis lanĉita de la Esperantistoj Judith Meyer kaj Chuck Smith, kaj de la pasinta jaro estas organizita de la teamo de E@I en Slovakio (aliaj Esperantistoj, do). Ekzistas ankaŭ alia eventserio, kiu nomiĝas « Polyglot Conference ». La Polyglot Gathering ĉiam okazis en Eŭropo, la Polyglot Conference ĉefe okazas en Eŭropo (kvankam ĝi tamen venis al Novjorko en 2015). Sed ne estis regula aranĝo por lingvemuloj en Nordameriko. Tian eventon starigis la ĉeforganizantoj de LangFest, Joey Perugino kaj Tetsu Yung. La unuan jaron, la evento sukcesis venigi pli-malpli



150 partoprenantojn de la tuta kontinento kaj eĉ pli for, kaj sukcesis allogi vaste konatajn prelegantojn, kiel Steve Kaufmann, Benny Lewis, kaj pluraj aliuloj.

En 2017, la evento entute venigis preskaŭ 400 homojn (inkluzive la grandan konferencan vesperon kun Stephen Krashen, unu el la plej elstaraj fakuloj pri lingvo-akirado, kaj Bella Devyatkina, 5-jaraĝa rusino, kiu jam parolas 8 lingvojn, kaj ŝia patrino). Venis ankaŭ Richard Simcott, Olly Richards, kaj pluraj personoj konataj en la Esperanto-mondo, kiel Chuck Smith. Pluraj el la ceteraj prelegantoj fakte parolas ankaŭ Esperanton : Lýdia Machová, Benny Lewis, Richard Simcott, Tony Harris, krom mi mem kaj Suzano Roy.

Mi fariĝis parto de la teamo de LangFest jam en 2016. Mi tiam proponis prelegi pri Esperanto kaj tion faris. Suzano Roy tie gvidis ankaŭ enkondukan atelieron pri la lingvo, tiun jaron kaj la postan. Mi rapide ankaŭ helpis pri la organizado. Nun mi laboras kun Joey Perugino, Tetsu Yung kaj la tuta teamo de LangFest por okazigi sukcesan eventon denove en 2018. Mia agado ĉefe temas pri sponsoradiĝo, komunikado kaj iugrade rilatoj kun prelegantoj kaj diversaj aliaj temoj laŭbezono.

Mi ŝatus ankaŭ mencii, ke KEA kaj Esperanto-USA

malavare sponsoris la eventon, kio permesis starigi budon dum la evento por informi la partoprenantojn pri Esperanto. Mi aparte ĝojas pri tiu fakto, kiun mi, fakte, instigis, ĉar temis pri grava agnosko, ke la du movadoj estas naturaj partneroj. Mi denove dankas la estrarojn de KEA kaj Esperanto-USA, respektive, pro ilia apogo.

Vi demandas, ĉu tio estas iusence Esperanteca agado. Kiel mi menciis antaŭe, ĝi ja estas unu el la vojoj, per kiuj mi celas konstrui pontojn inter Esperanto kaj aliaj komunumoj. Kompreneble, mi mem estas lingvemulo kaj ĝuas tiajn etosojn, sed jes, multaj el tiuj poliglotoj dividas kun Esperantistoj celojn, kiel respekto por lingva diverseco. Esperanto mem, kiel lingvo, estas parto de tiu diverseco, kaj la nunaj ebloj eklerni ĝin pere de la interreto certe permesas al scivolemaj lingvemuloj provi lerni kaj uzi ĝin. Dum tiaj aranĝoj oni sufiĉe ofte renkontas homojn, kiuj freŝdate lernis la lingvon. Kelkaj flue parolas, aliaj ne. Kelkaj poste partoprenas Esperanto-rondojn, aliaj ne, sed pli kaj pli da homoj almenaŭ scias pri ĝi. Mi do celas esti ligo inter tiuj du « mondoj », kaj tiusence oni povas taksi mian agadon Esperanteca.

Mi ankaŭ prelegis dum la du pasintaj eventoj : pri Esperanto en 2016, pri la lingva situacio de

Kebekio kaj pri la rilatoj inter lingvoj kaj povo en 2017. Venontjare, mi prelegos pri alia temo.

Ĉio ĉi, la UK, LangFest, kaj la ĝenerala emo rilate al lingvoj ĉi tie – parte pro ĝia specifa situacio, ankaŭ valorigas Montrealon (kaj pli ĝenerale ankaŭ Kebekion kaj Kanadon) kiel taŭgegan lokon por tiaj kunvenoj. La lingva demando estas parto de la vivo tie ĉi, kaj eĉ plie, estas viglaj teamoj nuntempe en la urbo. Tio igas Montrealon grava centro por lingvemuloj.

Mi ŝatus aldoni ankaŭ, ke tiuj aranĝoj venigas turistojn. Aparte pri la UK, oni povas antaŭvidi, ke tio venigos pli ol 1000 partoprenantojn, kiuj restos – plejparte – almenaŭ unu semajnon aŭ pli. Entute, oni verŝajne rajtas atendi, ke la UK alportos milionojn da dolaroj al Kebekio. Kiu diris, ke Esperanto utilas al nenio kaj neniu, kaj ke Esperanto kaj ekonomio estas du

tute malecaj nocioj ? Espereble mi ne ofendos iun ajn dirante, ke ankaŭ por Esperanto ekonomiaj realoj gravas. Homoj unuavide taksas utilon laŭ mono. Oni povas bedaŭri tion, sed ĉiuj devas vivi, manĝi, sin vesti, ktp. Kompreneble, la homa, kultura, intelekta, ktp. valoro de la lingvo estas

vaste pli granda ol tio, sed ekonomia valoro pruvas al tiuj ekster niaj rondoj, ke nia agado havas neneglektendan efikon. Mi plie rimarkas, ke pluraj Esperantistoj nuntempe pensas, ke ankaŭ Esperanto povas ludi

ekonomian rolon (ekzemple, Amikumu).

Ni do estu ne nur afablaj avangarduloj (aŭ stranguloj laŭvidpunkte), sed ankaŭ valoraj membroj de nia loka komunumo. Ni estu realismaj idealistoj !



Montreala Esperanto-Kunveno (2017)

# 1910 : Zamenhof en Nord-Ameriko

*Saviez-vous que Zamenhof avait visité Montréal en 1910, après le Congrès mondial d'espéranto de Washington ? Les journaux de l'époque (compilés par Zdravka Metz) et la biographie de Zamenhof de Marjorie Boulton retracent ses pas en Amérique du Nord.*

## *Zdravka Metz*

*Veninte al Montrealo en 1982, mi aŭdis, ke Zamenhof vizitis Montrealon post la Vaŝingtona Internacia Kongreso (la tiama nomo por la UK). Mi trovis en Jarlibro, ke temas pri la jaro 1910, sed mi ne sciis, kie komenci por informiĝi pli. Mi skribis al amikino, kiu plusendis mian leteron al Davor Klobučar. Li sendis al mi ligan al Aŭstria Nacia Biblioteko (ÖNB) kaj mi povis trovi Esperantajn gazetojn de tiu tempo. Vi trovos ĉi-sube transkribaĵojn de informoj trovitaj en The British Esperantist kaj en la revuo Amerika Esperantisto, ambaŭ el la jaro 1910.*

*Plej informplena estis por mi la revuo The British Esperantist de*

*1910, speciale la oktobra numero, kiu aperigis priskribojn kaj de vojaĝoj, kaj de « La Sesa » mem (tiel oni nomis tiutempe la kongreson). Sinjoro W. W. Mann el Britio havis la taskon akompani la*

*Majstron kiel « korpogardisto kontraŭ troaj ĵurnalistoj » kaj tiel li partoprenis eĉ « privatan » vojaĝon de Zamenhof kaj de lia edzino al Montrealo. S-ro Mann restis kun ili en hotelo kaj pasigis tri familiajn tagajn kunvivadojn, ĝis la trajna foriro de la Majstro al Novjorko. **Z. Metz, la 16-an de decembro 2017 (okaze de la Zamenhof-festo en Montrealo)***

*En junio, laŭ ideo de Zamenhof, estis sendita alvoko tra gazetaro al Esperantistoj, ke ĉiu urbo aŭ*



Zamenhof en sia laborejo, ĉ. 1910



« George Washington » en 1909



« George Washington », ĉambro de la unua klaso

lando estu reprezentata dumkongrese. « Se vi ne povas vojaĝi, en via grupo elektu iun, kiu reprezentos la grupon, sed ĉiuj kune helpu pagi elspezojn de vojaĝkostoj ».

Centra Oficejo (sidejo en Svislando, Ĝenevo) aranĝis vojaĝon de Eŭropo per ŝipo « George Washington » de Antverpeno al Novjorko kaj la restadon de du tagoj, kaj de Novjorko trajne al Vaŝingtono – ĉefurbo – de 300.000 loĝantoj.

### **Ŝip-vojaĝo kaj antaŭkongreso en Novjorko**

Lokaj Esperantistoj restis ĉe kajo kaj la ŝipo estas foriranta.

Por Esperantistoj ĉiukore kaj ĉiulande kunigitaj per la interna ideo de la Esperantismo, efektive, disiĝo

ne ekzistas – per forta voĉo ĉiuj ekkantas « La Espero »-n. En tiu sento ni rigardis ilin iom post iom malaperi, ankoraŭ per manoj kaj tukoj ilin adiaŭante. Lasta bildo en tago.

Vojaĝo de Antverpeno daŭris de 3-a de aŭgusto ĝis 12-a de aŭgusto al Novjorko. Sur mirinda ŝipo estis agrable por 17 kongresanoj, per rapideco de 20 mejlojn hore.

Sur la ŝipo estis en la unua klaso 430 personoj, la dua klaso – 420 personoj, la tria klaso – 500 personoj, la kvara klaso – 900 enmigrantoj ; plej sube estis ankaŭ loko por laborantoj de la ŝipo, sed ne eblis viziti.

Sur ferdeko estis la loko por amuzi pasaĝerojn : ŝovbildo kaj ringoĵetado, orkestro kaj dancoj



vespere, en ŝipgazeto estis anoncitaj prelegoj pri Esperanto.

Oni faris MULTEGE da propagando sur la ŝipo : la 7-an kaj 8-an de aŭgusto por la pasaĝeroj en la unua kaj dua klaso okazis prelegoj angle kaj germane pri Esperanto. Ni disdonis flugfoliojn, ni havis Esperanto-kursajn lecionojn, librovendejo sur ŝipo havis E-lernolibrojn, tablo de Zamenhof estis flag-ornamita. Tiel, neniu de 1700 pasaĝeroj nun povas diri, ke ili ne aŭdis pri Esperanto... Ŝipo estas ideala propagandejo. Ĉiuj Esperantistoj bedaŭris, ke la vojaĝo ne daŭris ankoraŭ ok tagojn.

Alveninte Novjorkon, la Majstro kaj S-ino

Zamenhof – kaj cetere ĉiuj – estas en plej bona sano.

En Novjorko, sur la kajo atendis nin novjorkaj gesamideanoj kaj S-ro Silbernik, la bofrato de Zamenhof.

Ni tranoktis en hotelo « Herald Square », ĉe angulo de 34-a Strato kaj Broadway-strato. Ni restis du tagojn en Novjorko, ĉiam vizitante la urbon.

La 13-an de aŭgusto ni ekvojaĝis trajne – dum kvin horoj – ĝis Vaŝingtono.

13-an de aŭgusto – Vaŝingtono – jam vespere – ĵurnalistoj intervjuis Zamenhof, kaj li rakontis unuajn impresojn :

*« Tio, kio plej multe min impresis, tuj kiam ni metis piedon sur la teron en nova mondo, estis la sento de libereco, kiu kvazaŭ vibras en la aero usona, kaj aperas videble sur preskaŭ ĉiu vizaĝo, kiun oni renkontas sur la stratoj. Ankaŭ min multe frapis la viva nerva energio, kiu evidente instigas ĉiun amerikanon. Estas por mi kvazaŭ nova lando, al kiu mi ankoraŭ ne tute alkutimiĝis. Novjorko estas urbego tiel kolosa, tiel dinamika [red. tiel], tiel tute malsimila je kiu ajn eŭropa urbo, ke ĝi inspiras ĉe mi nevenkeblan miron. Kvankam la Esperantista*

*movado en Usono estas ankoraŭ tute juna, ĝi jam montras grandan vivopovon, kaj promesas vastan progresadon. Eble la plej grava afero por la disvastiĝado de nia afero estas kuraĝigo kaj kora kunhelpado de la tutmonda gazetaro, kaj poste la simpatio kaj aprobo de ĉiuj lernejoj kaj kolegioj. Ke nia lingvo Esperanto tiom penetru en la lernejojn de Usono, kiom ĝi jam pli kaj pli penetras en multajn lernejojn en Eŭropo, tio estas la plej kara revo de nia tuta Esperantistaro. »*

## **Vaŝingtono preparis sin por internacia kongreso**

**Turistaj aŭtomobiloj** estos vidataj dum kongresa semajno, Esperanto-paroladistoj kaj 20% rabato por kongresanoj.

Ĉiu, kiu vojaĝas **trajne tra Usono**, per prezento de kongresa karto, havos rabaton de 20%.

**Esperanto-parolantaj policanoj** : Esperanto-policanoj zorgos pri ĉeestantoj dum *La Sesa*. Ili lernadis Esperanton. La policistestro de distrikto Columbia kompleze promesis meti ilin je dispono dum kongresa semajno.

**Centra Manĝejo** : dum ĉiu manĝo prezidos iu konata Esperantisto, kaj oni prezentos mallongan programon de kantado, deklamado k.t.p.



**Antaŭkongreso** : 1-2 tagoj en Novjorko, vojaĝo de Novjorko al Vaŝingtono trajne — foriro ĉiuhore.

**Postkongreso** sabate per ŝipo sur rivero Potomac — reveno lundon matene, en lundo foriro laŭplaĉe : Bostono aŭ Niagaro.

## **Programo de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto**

**Sabaton**, la 13-an de aŭgusto, 1910 : alveno de kongresanoj, enskribiĝo akceptejo, enloĝado.

Manĝo, neformala festo, antaŭkongresa akceptado kun ĉeesto de D-ro Zamenhof, muziko, paroladoj.

**Dimanĉon**, la 14-an matene : diservoj ; posttagmeze : vizitado al la urbaj vidindaĵoj; vespere : koncerto kun partoprenantoj el ĉiuj partoj de la mondo.

**Lundon**, la 15-an matene : kunvenoj por elekti naciajn delegitojn, solena malferma kunsido, parolado de D-ro Zamenhof, salutoj de la registaraj kaj naciaj delegitoj. Posttagmeze : daŭrigo de la delegita salutado, unua labora kunsido de la kongreso. Vespere : veturado sur speciala vaporŝipo – rivero Potomac, ekskurso estos senpaga por kongresanoj ; muziko, dancado, manĝado sur la ŝipo. (*Red. : legu la plenan tekston*



Kongresanoj (1910, Vaŝingtono)

de la malferma parolado ĉe [esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/parolo6.htm](http://esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/parolo6.htm)).

**Mardon**, la 16-an : kunvenoj de la lingva komitato kaj specialistaj fakoj, eble ankaŭ ĝenerala kunsido de la kongreso, tramvoja ekskurso al la granda

Akvofalo sur la rivero Potomac, eksterdoma tagmanĝo, senpaga por abonintoj ĉe la centra Manĝejo (50 cendoj por aliaj). Vespere

okazos unika festo : subĉiela prezento, per la konataj profesiaj aktoroj *Hickman Players* de la ĉarma arbara teatraĵo *Kiel plaĉas al vi* de Shakespeare – speciale tradukita por la Sesa Internacia Kongreso, al nekongresanoj biletoj kostos 50-75 cendoj aŭ 1 \$.

**Merkredon**, 17-an : kunvenoj de la Internacia Konsilantaro, Internacia Scienca Asocio kaj ĝenerala kunsido de la Kongreso, posttagmeze – vaporŝipa ekskurso al Monto Vernon, la malnova



Konataj profesiaj aktoroj ludis  
*Kiel plaças al vi* de Shakespeare

hejmo kaj  
bieno de G.  
Washington, la  
unua  
prezidento de  
Usono –  
kosto : 75  
cendoj.  
Vespere : vizito  
al Tutamerika  
Palaco de  
Paco. Oficejo  
faros akcepton

de Dr. Zamenhof kaj la kongresanoj. Poste :  
disdonado de l' premioj de la Literatura konkurso.

**Ĵaudon**, la 18-an : kunvenoj de UEA kaj aliaj  
specialistaj asocioj. Posttagmeze : granda publika  
basbala konkurso de la *American Baseball League*.  
Miloj da usonaj spektantoj ĉeestos ĉi tiun gravan  
spektaklon de la nacia sporto, kaj speciale verkita  
libreto permesos al la *profanuloj* sekvi la ludon.  
Vespere : diversaj interesaj paroladoj pri gravaj  
temoj.

**Vendredon**, la 19-an : specialistaj kunsidoj kaj  
ĝenerala kunsido ; vizitado al urbaj vidindaĵoj. La  
komitato esperas anonci akceptadon al la  
kongresanoj ĉe la *Blanka Domo*, sed prezidanto

Taft ne decidis. Vespere : La internacia Balo – ĉiu  
alilandano estas insiste petata porti la vestaĵojn de  
sia propra lando aŭ provinco. Aldone kelkaj  
Filipinanoj dancos karakterizan Filipinan dancon.

**Sabaton**, la 20-an : finaj laboraj kunsidoj de  
specialistaj kunvenoj. Lasta labora kunsido de la  
Sesa, lasta komuna tagmanĝo, solena ferma  
kunsido, ferma parolado de Zamenhof. (*Red. : legu  
la plenan tekston de la parolado ĉe*  
[esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/parolof1.htm](http://esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/parolof1.htm))

### Postkongreso kaj vizito al Niagaro

Ĝi okazis per trajno : la plejparto de eŭropanoj  
vojaĝis tien dimanĉon matene. En Buffalo ili devis  
eltrajniĝi kaj preni novan vagonon por Niagara –  
laŭ bordo de larĝega lago Erie. Ili loĝis en Hotelo  
ĉe Niagara – de usona flanko. Zamenhof renkontis  
onklinon Nathan Lewis, kuzinon Helen Lewis kaj  
kuzon Jack Zamenhof, kiujn li ne vidis de pli ol  
dudek jaroj !

Ŝi nun venis por bonvenigi sian nevon kaj lian  
edzinon, kaj rekonduki ilin kun ŝi al Montrealo, kie  
la ceteraj familianoj senpacience atendas ilian  
alvenon. Ĝis lia foriro el Ameriko, la Gemajstroj  
devis esti iliaj gastoj.

Ni ekveturis en kaleŝo por viziti belaĵojn de  
Niagaro.



## Survoje Kanaden

Kaj nun antaŭen al Montrealo !

Tiun urbon ni volis atingi per vojo de lago Ontario kaj la rivero Sankta Laŭrenco – multe pli bela ol la veturo per la fervojo. Ni ekiris de Lewiston per la « *Kingston* » – granda vaporŝipo, kun triopa vico de ferdekoj laŭ la tipo kutima sur la lagegoj. Pli ol 30-hora veturado por trairi la tutan longon de la lago, kaj mi timis, ke pro troaj vojaĝantoj, la Gemajstroj devos dormi sur seĝo.

Sur enŝipigejo en Montrealo estis pluraj gekuzoj de la Majstro. Okazis ĝojfamilia reunuiĝo, intima sceno, en kies feliĉeco mi ankaŭ, estante ano de la *granda rondo familia*, partoprenis kun kora kunsento.

Hotelo Windsor en Montrealo – kie ni devis esti dum kelkaj tagoj la gastoj de kuzo – Louis Zamenhof.

Samvespere festeneto, kiun ĉeestis 12 Zamenhofoj aŭ bo-Zamenhofoj, ili inaŭguris la alvenon de la Majstro en Montrealo.

Kvankam la Doktoro vojaĝis nun por tiel diri nur *private*, li devis submeti sin la morgaŭan tagon al intervjuo de redaktisto de la *Montreal Daily Star*<sup>\*</sup>,

en kiu poste aperis pli ol unu kolumo da raporto pri nia afero. La ceteran tempon de sia restado en Montrealo la Gemajstroj pasigis tre plezure en veturoj kaj ekskursoj kun sia parencaro.

La familio okupas belan kamparan dometon en Beaconsfield, 20 mejlojn for de Montrealo kaj apud la Sankta Laŭrenco. Du aŭ tri fojojn ni iris tien aŭtomobile, kaj la rapida veturo laŭ la bela bordo de la rivero estis sperto tre plezuriga. La intimaj kunvenoj en la ĉarma vilao estis tre agrablaj. Neniam mi vidis familion pli unuecan, pli ame interligitan en ĝiaj anoj. Estis efektive pli ol unu familio : S-ino Nathan Lewis, ŝiaj filinoj : Helen, Stephanie kaj Eugenia kaj iliaj edzoj ; S-ro Jacobs kun edzino, kaj S-ro Levy, lia filo Felix kaj liaj nepoj Jack kaj Louis Zamenhof.

Kun muziko kaj babilado kelkaj tagoj rapide pasis.

Stacidomo de Montrealo – antaŭ la vagonaro - « gekuzoj », kiujn la trajno portos al Novjorko, por enŝipiĝi trans la maro Eŭropon kaj al Varsovio.


*\* Red. : La tiamaj numeroj de The Montreal Daily Star ne estas ciferigitaj, sed paperaj ekzempleroj konsulteblas en BANQ (Bibliothèque et Archives nationales du Québec), kiel oni vidas serĉante ĉe [iris.banq.qc.ca](http://iris.banq.qc.ca).*

# Zamenhof en Montrealo

Marjorie Boulton, en sia biografio de Zamenhof, *Zamenhof aŭtoro de Esperanto* (La Laguna, J. Régulo, 1962), rakontas pri lia vojaĝo al Montrealo en 1910, post la Universala Kongreso en Vaŝingtono. Jen la elĉerpaĵo, el p. 192.

« Post la Kongreso [de Vaŝingtono en 1910] Zamenhof kaj Klara ĝuis postkongresan ekskurson, kiu komenciĝis la 21an de aŭgusto. Ili vojaĝis per Pullman-vagono (luksvagono) ĝis Buffalo, ĝuante belegajn montarajn panoramojn ; poste, per ekskursiva vagonaro, al Niagaro. La sekvantan tagon, Zamenhof renkontis kelkajn familianojn post dudekjara disiĝo : onklinon, s-inon Nathan Lewis ; kuzinon, Helen Lewis, kaj kuzon, Jack Zamenhof, kiu eskortis lin al Montreal, kie aliaj gekuzoj atendis lin, kaj dudek Zamenhof-familianoj ĉeestis festan vespermanĝon. Tiuj familianoj gastigis Zamenhof kaj Klaran en la Hotelo Windsor. Unufoje ĵurnalisto intervjuis ilin, sed alie ili ĝuis iom da paco kaj ripozo, veturis al la familia somerumejo en Beaconsfield, apud la rivero Saint Lawrence, kaj ekskursis sur la kamparo. Kelkaj familianoj komencis lerni Esperanton, kaj promesis daŭrigi tiujn studojn.

La 3an de septembro, Zamenhof kaj Klara



ekvojaĝis el Novjorko sur la ŝipo 'Kaiserin Aŭguste'. »

*Red. : Temis pris la germana ŝipo Kaiserin Auguste Viktoria, t.e. Imperiestrino Auguste Viktoria. Oni tiel nomis ĝin, ĉar la imperiestrino mem baptis ĝin. Parenteze, ŝi estis la lasta germana imperiestrino kaj reĝino de Prusujo: Auguste Viktoria von Schleswig-Holstein-Sonderburg-Augustenburg (1858–1921). Kiam la ŝipo eknavigis, en 1906, ĝi estis la plej granda pasaĝerŝipo ĝis tiam konstruita. Ĝi regule veturadis inter Novjorko kaj Hamburgo ĝis la milito en 1914. Post la milito ĝi estis cedita al la venkintoj. En 1921 aĉetis ĝin la firmao Canadian Pacific Steamships, kiu renomis ĝin Empress of Scotland. Oni forvendis ĝin por malkonstruo en 1930. (El la Vikipedioj angla, Esperanta, franca, germana.)*


# Esperanta movado en Kebekurbo : epizodo 1

*Jacques Gaucher*

*L'auteur raconte comment il a appris l'espéranto dans les années cinquante, à Québec, grâce à l'aide d'espérantistes américains. Ayant acquis une bonne compétence dans cette langue, il l'a ensuite enseignée, ce qui l'a finalement amené à fonder à Québec un club d'espéranto.*

Ĉirkaŭ 1953, dum mi foliumis la francan vortaron por trovi la signifon de iu vorto, mi hazarde renkontis la vorton « espéranto ». Volante scii pli, mi skribis al Unesko kaj demandis, kion ili povas diri al mi pri tiu temo. Ili gvidis min al Esperanto-Asocio de Norda Ameriko, ĉe kiu mi konatiĝis kun Alan kaj Doris Connor, kiuj multege helpis min.


Ili tuj bonvenigis min en la Esperanto-mondon kaj vendis al mi lernolibron kaj du vortarojn, per kiuj mi mem lernis kune kun mia fianĉino Jocelyne. Ni, ridemaj, parolis unu al la alia ne sciante, ĉu ni havas bonan akĉenton. Intertempe mi gardis kontakton kun la novjorka oficejo, unue skribe, poste



parole uzante telefonon. Li certigis, ke mia akĉento estas eĉ pli bona ol la lia. Mi tuj kredis lin, ĉar li havis fortan anglan akĉenton.

Post tri monatoj, pensante, ke mi estas diplomebla, li sugestis, ke mi flugu al Novjorko por subiĝi al ekzameno. Tion mi faris, kaj la 5an de marto 1958 mi revenis kun « Atesto pri lernado », kiun mi ankoraŭ havas post pli ol sesdek jaroj, kaj la 9an de junio 1958 mi revenis kun « Atesto pri kapableco », kiu estas supera diplomo.

Tiuj diplomoj sufiĉis al mi, subtenata de mia fianĉino, por trovi la bezonan kuraĝon por lanĉi Esperanton en mia urbo, Kebeko. Mi metis reklamon en la lokan gazeton, en kiu mi promesis,



ke, se post tri monatoj, studentoj ne parolos sufiĉe flue, mi redonos la 25 \$, kiujn ili pagis por la kurso. Mi redonis la 25 \$ nur unufoje, al studentino, kiu ne vere volis lerni Esperanton. Ŝi nur volis esti ĝentila kaj akompani amikinojn, kiu vere volis lerni.

Nun, kun pli-malpli 25 Esperantistoj, alvenis la tempo fondi oficialan klubon. Mi unue verkis konstitucion por la klubo, kiu estis aprobita de la membroj. (Mi ankoraŭ havas, en la franca lingvo, tiun dokumenton.)

## L'Alvoko en la reto !

Esperanto-Societo Kebekia (ESK) ĝojas prezenti en ciferecigitajn versiojn (je PDF-formato) de *L'Alvoko*, oficiala organo de la Kebeka Esperanto-Klubo (KEK) komence de la 1960-aj jaroj. Tiuj 15 numeroj, publikigitaj inter 1962 kaj 1964, ĉerpiĝas el la personaj arkivoj de S-ro Jacques Gaucher, kiu aktivis en la klubo tiuepoke kaj kiun ESK elkore dankas:

[www.esperanto.qc.ca/eo/lalvoko-eo/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/lalvoko-eo/)



**AU CONGRES ANNUEL DES ESPERANTISTES**, en remarkat des reprezentantis de diferentis pays. De gauche à droite: M. JACQUES GAUCHER, président du Club de Québec; le Dr William SOLZBACHER, originaire d'Allemagne, pident du congrès; Mile ELLEN LEWIS, de Porto-Rico; M. J SILVERMAN, de New York et M. CHAANSHIK CHOI, de rée. (Photo de "L'Événement-Jour")

**L'esperanto s'est acquis une place importante dans le monde**

Le 48e congrès annuel de l'Association espérantiste d'Amérique du Nord, qui s'est tenu à Neuville en fin de semaine, a réuni quelques 60 représentants de plusieurs parties du Canada et des États-Unis. Il avait pour tout dans la région de Montréal. Une jeune demoiselle de Neuville, Mlle Ellen Lewis, a rappelé qu'elle travaille l'espéranto dans une école privée qu'elle a fondée à Santurce, au Puerto Rico.

Au congrès annuel de l'Association espérantiste d'Amérique du Nord tenu à Neuville. — Discussions des diverses méthodes d'enseignement de l'esperanto. — Moyens à prendre pour introduire cet enseignement dans les écoles.

**du haut des remparts**

par Gérard LANGLOIS

**L'espéranto gagne des adeptes à Québec**

Des centaines de personnes se sont inscrites aux cours de langues étrangères à l'Université Laval et dans différentes institutions d'enseignement de Québec depuis quelques années. Outre l'anglais, bien entendu, l'espagnol, le portugais, l'italien et même le russe, sont les langues secondes les plus populaires dans notre milieu.

C'est M. Jacques Gaucher, un employé d'Air Canada, qui a été l'instigateur des cours d'espéranto à Québec. M. Gaucher a même déjà réussi l'exploit d'obtenir un congrès international d'espéranto qui s'est déroulé au Castel Vauquelin à Neuville.

L'espéranto est la seule langue qui peut se prétendre internationale, car elle s'enseigne dans tous les pays du monde, et l'on rencontre partout des gens qui parlent espéranto. Cette langue enfin s'apprend très facilement.

**Fondation d'un club espérantiste à Québec**

Jeudi, le 1er mai 1958 a été fondé à Québec, le premier club officiel d'Espéranto et ce, en prévision du congrès annuel qui aura lieu à Neuville en juillet prochain. Une vingtaine de membres font actuellement partie du "Kebeka Esperanto-Klubo", dont les réunions hebdomadaires se tiennent le mercredi soir, à 20h00.

Terrassé Stuart, Sillery. Le bureau de direction se compose comme suit: Jacques Gaucher, président, Roméo Campbell, vice-président, Jocelyne Montminy, secrétaire, Hélène Piché, trésorière, Marie Légaré, publiciste. Les membres actuels et éventuels sont priés de communiquer avec M. J. Gaucher, LA 7-9813 ou M. R. Campbell, MU 1-4928.

"SEE YOU IN FRANCE!"

48th Esperanto Congress  
July 4th, 5th, 6th, 7th  
Neuville, Quebec, Canada

We meet this year as guests of our French-Canadian Esperantists at the lovely "Castel Vauquelin" pictured here. It is directly on the banks of the majestic St. Lawrence, in the picturesque village, Neuville, just 18 miles from the walled city of Quebec. We will enjoy the wonderful old-world charm of colorful French Canada.



We will also visit the ancient city of Quebec of course. The French atmosphere of Quebec province has quite an impact on first-time visitors. This summer of 1958 has special significance for the city of Quebec, for the original fortress commanding the St. Lawrence was founded in 1608 by Champlain. To mark this 350th anniversary, the people will celebrate throughout the summer, with street parades, dancing in the streets, fireworks, special exhibits, etc. Historic places and shrines abound, too.

At the present writing, April 30, there has already been an excellent response to the Congress Bulletin sent out just a short time ago. Not only "attendance-by-mail" through the purchase of Congress Tickets, but "attendance-in-person" from Connecticut, Florida, Maine, Massachusetts, Missouri, New Jersey, New York, Puerto Rico, Washington, D. C., West Virginia, and several places in Quebec and Ontario of course. Most members will make reservations through the month of May, but it is well to send your reservation at earliest moment now to get best accommodation. See Congress Bulletin for details, and ask for more if you can use them. Also ask for more folders on "Castel Vauquelin", Quebec, etc., too.

Summary of the more important points: *Time* - try to arrive for the get-together lunch on July 4th. For those with little time to spare, July 5th and 6th are the two most important days for Congress business. The excursion to Quebec on July 7th is very much a high light for all who can attend. *Program* - the most enjoyable in years. *Reservations* - send deposit \$3 per person, along with purchase of Congress Tickets, \$3 adult, \$5 couple, \$1 student. All-inclusive rates at the "Castel", \$8 for each full day, on the basis of two in a room, incl. bed, three meals, arrangements (except excursion bus fare). Pro rata for less than full days. Space is somewhat limited, so send your reservations SOON.

Buy a Congress Ticket (\$3) and Help Support the Quebec Congress.



La Esperanto-Societo de Maŭricio en Trois-Rivières, Kanado, havas estraron, kiu estas videbla sur foto represita el la ĵurnalo Le Nouvelliste, 30 Januaro 1958. De maldekstre dekstren aperas en la unua vico: F-ino Denise Baril, kassistino; S-ro Georges Héroux, urba civila inĝeniero, sekretario; S-ino Georges Héroux, prezidantino; S-ro Maurice Grenier, vicprezidanto; F-ino Jacqueline Girard (nevino de la urbestro), ĵakestrino pri publikigoj. Maldekstre dekstren en la dua vico: Profesoro Roger Garceau, lernejestro; S-ro Robert Julien, estro de la socia komitato; S-ino Hervé Biron (edzino de la ĉefredaktoro de Le Nouvelliste), ĵakestrino pri eksteraj rilatoj; F-ino Liliane Viel, bibliotekistino; S-ino Roland Guay, konsilantino; D-ro Roland Lacharité, konsilanto.

### ESPERANTO VIVAS EN KANADO

En la urbo Trois-Rivières kaj en la ĉirkaŭa regiono de Maŭricio (nomita laŭ la rivero de Sankta Maŭricio, kiu ĉe Trois-Rivières enfluas en la Riveron de Sankta Laŭrenco) la Esperanto-movado estas tre vigla. En Januaro 1958 oni definitive starigis la Regionan Societon kaj elektis la estraron. La postan tagon loka radio-stacio intervjuis la prezidanton, S-inon Georges Héroux, dum duona horo. La ĵurnalo *Le Nouvelliste* publikigis longan artikolon pri Esperanto kaj la lokaj Esperantistoj. S-ino Héroux gvidas novan Esperanto-kurson. Ŝia bofratino, F-ino Marguerite Héroux, gvidis kurson ĉe la Bell-Kompanio, sed devis ĉesigi ĝin, ĉar la telefonistinoj deĵoras je tre malsamaj horoj. En Maŭricio ekster Trois-Rivières grupo jam ekzistas en Charette, kaj oni esperas starigi aliajn. La societo en Trois-Rivières organizis tre sukcesan vintran feston (*sleigh ride*).

D-ro Toshihide Kuwahara, japana kemiisto, vizitis la urbon Québec fine de Februaro 1958, kaj la ĵurnaloj (ekz. *Le Soleil* kaj *L'Evenement-Journal*) publikigis longajn raportojn pri tiu vizito kaj pri la fakto, ke dum ĝi la japana sciencisto parolis nur Esperanton. La ĵurnaloj rakontas, ke D-ro Kuwahara interrilatis pere de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko kun S-ro Fernand Trudel kaj ke, kiam la aeroplano alvenis en L'Ancienne Lorette, grupo de Esperantistoj atendis lin. La raporto de Huguette Boivin en *L'Evenement-Journal* rakontas kun entuziasmo, ke D-ro Kuwahara trovis la malnovan kanadan urbon Québec kun ĝiaj multnombraj historiaj rememoroj trege interesa kaj ke ĉiu, kiu renkontis la japanan eminentulon, estis kaptita de lia ĉarma personeco.

El la provinco Kebeko venas diversaj raportoj pri kreskanta aktiveco por Esperanto. En Neuville Jacques Gaucher faras planojn por la Kongreso. En la urbo Kebeko Romeo Campbell instruas Esperanto-kurson ĉiumarde; kunlaboras Fernand Trudel, pri kiu vidu supre. En St-Barnabé-Nord instruisto Bruno Samson enkondukas Esperanton al siaj studentoj.

45

### Fondation d'un club d'Esperanto

La ville de Québec a été dotée, en 1958, de son premier club officiel d'Esperanto, en prévision d'un congrès annuel qui aura lieu à Neuville, en juillet prochain.

Le bureau de direction du "Kebeka Esperanto-Klubo" se com-

pose de M. Jacques Gauthier, président, de M. Roméo Campbell, vice-président, de Mlles Jocelyne Montminy, Hélène Piché et Marie Légaré, respectivement secrétaire, trésorière et publiciste.

Une vingtaine de membres font actuellement partie du club et tiennent une réunion hebdomadaire, chaque mercredi soir, à 2090 Terrasse Stuart, à Sillery.

# Linukseca lingvo

*Nicolas Viau*

*L'auteur compare l'espéranto au système d'exploitation Linux, qui, petit à petit, se répand à travers le monde.*

Oni ofte konsideras, ke Esperanto havas du eblajn kaj indajn celmodelojn : la finvenkisman kaj raŭmisman.

La fama finvenkisma modelo konsideras, ke per grandaj politikaj decidoj oni, unu tagon, decidos, ke ĉiuj lernejoj de la mondo instruu la Zamenhofan lingvon, kaj ke tiel ĉiuj povos libere kaj fratece paroli kun aliaj homaranoj, malfermante novan epokon de la homaro, kun frateco, egaleco kaj paco. Tiu modelo havas la samajn radikojn, kiel tiuj de la grandaj utopiaj ideologioj : socialismo, intermilita pacismo, ktp. Ŝajne tiu estis la ĉefa sinteno dum granda parto de la dudeka jarcento. Ĝi estis vera movado.

La dua modelo estas la tiel nomata raŭmisma modelo : Esperanto valoras per si mem kaj ekzistas per kaj por siaj parolantoj. Ĝi estas malferma internaciema kulturo kaj tutmonda reto por siaj

parolantoj, sed ne celas disvastiĝi tra la mondo por fariĝi la ĉefa internacia lingvo. Esperanto do ne celas mondoŝanĝon kaj fariĝas nur alia komunumo inter multaj aliaj, en mondo, kie la interreto permesas al multaj homoj eĉ geografie dise loĝantaj trovi sin kaj kuniĝi. Ĝi allogas, laŭ miaj observoj, sufiĉe multajn homojn, kiuj jam

partoprenas samecajn komunumojn, ekzemple, vegetaranojn kaj veganojn, maldekstremulojn (tiujn du jam delonge), informadikistojn, lingvemulojn, sed ankaŭ sociajn malplimultojn, kiel ekzemple GLAT-uloj (gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj). Tio, fakte, pli-malpli priskribas la nunan staton de nia lingvanaro, kaj jam ekzistas

inter ĝi sufiĉe vasta, bunta kaj interesa personaro, kiu kreskas per novaj lernometodoj, ĉefe interrete.

La eco de la movado do restas memsufiĉa komunumo. Kiel oni povus grandigi ĝin kaj transiri tiujn komunumajn limojn ? Ĉu oni forlasu ĉiujn



celojn pri mondoŝanĝo, ekzemple plijustigi la internacian komunikadon ? Ĉar, se la lingva problemo ja evoluis, tamen, kontraŭe al la kredo de sufiĉe multaj homoj, ĝi tute daŭras.

Ĉiuj lingvolernantoj bone scias, tra personaj spertoj, ke paroli kun denaska parolanto de alia lingvo donas al la denaskulo grandan avantaĝon en la konversacio. Denaskuloj facile kaj senstrebe komprenas, parolas, ŝanĝas la frazstrukturon, komprenas kaj faras ŝercojn, kaj kutime havas pli vastan vortprovizon. Pro tio oni, ekzemple, sufiĉe ofte uzas interpretistojn en nuntempa diplomatio, ĉar la respondeculoj vere volas certi pri la signifo de tio, kion ili diras. Paroli sian denaskan lingvon internacie do povas esti sufiĉe klara avantaĝo.

Lingvolernado ankaŭ okazigas elspezojn. Kostas tempon kaj monon (tra edukado en lernejoj, ktp) lerni lingvon. Ankaŭ kostas la malgajnoj tra malefiko pro neuzo de la denaska lingvo, sed ankaŭ la gajnoj de landoj, kie oni parolas la lingvon, ĉar oni vojaĝas al ili, oni aĉetas de ili lernorimedojn, kaj ili posedas diversajn kulturajn industriojn (filmajn, eldonajn), kies produktojn aĉetas alilingvanoj aŭ por lerni aŭ simple por aliri la enhavon tra la lingvo (kio do respondas al malgajno de alia lingvoregiono). Paroli sian denaskan lingvon internacie do povas esti sufiĉe klara avantaĝo. Kiel oni vidis, ne temas nur pri

simboloj, sed fakte lingvo ankaŭ forte influas la ekonomion, interalie.

Kompreneble oni ne celas montri, ke studi, paroli, funkcii en alia lingvo ne eblas. Evidente tio eblas, kaj multaj homoj faras tion, kelkaj facile, aliaj malfacile, laŭ siaj spertoj kaj kompetencoj, kaj foje agrable, foje malagrable. La afero varias laŭ personaj kondiĉoj. Ĉiuj Esperantistoj devus havi almenaŭ iun senton rilate tion danke ĝuste al Esperanto. Tio, kion mi celas signifi ĉi tie estas, ke homgrupoj (organizoj, firmaoj, tutaj socioj) ĝenerale profitas de la uzo de sia propra lingvo – kaj en kelkaj situacioj tio signifas, ke aliaj grupoj malprofitas.

Kompreneble tio ne ĉiam eblas. Tiam oni preferu relative neŭtralan lingvon, kiel Esperanto, inter la koncernata diverslingva loĝantaro, ol la denaskan lingvon de parto de ĝi. La problemo estas, ke, se oni uzas ĉi-lastan lingvon, la komunikado, en iu situacio, okazas danke al la streboj de ĉiuj ĉeestantoj krom la denaskaj parolantoj de la komuna lingvo. Kaj tial la ideo uzi neŭtralan – kaj laŭeble facile akireblan – helplingvon valoras.

Sed la demando ĉiam estis, kiel oni enkonduku tian neŭtralan lingvon ? Lingvouzo povas parte esti la rezulto de institucioj, sed ankaŭ kutime estas la rezulto de multnombraj etaj decidoj faritaj de ĉiuj,

ĉiutage. Oni ne povus facile enkonduki tian lingvon desupre. Oni devas konvinki homojn, ke ĝi valoras, ke la ideo indas, desube. Sed unue oni devas eduki ilin. Multaj ne klare konscias pri la problemo mem !

Ne ekzistas perfekta egaleco inter lingvoj. Perfekta egaleco ne eblas. Ĉiam estos grandaj kaj malpli grandaj lingvoj. Tamen oni povus doni elekton kaj ebligi la uzon de pli justa lingvosolvo. Oni devus sciigi homojn pri la problemo kaj montri, ke neŭtrala pontlingvo povus helpi. Por montri tion, mi sugestas, ke oni enkonduku Esperanton ne kiel solan komunan lingvon, sed kiel plian lingvon.

Nuntempe, tiu elekto ne ekzistas. En diversaj internaciaj forumoj uziĝas aŭ aro de kelkaj vaste parolataj lingvoj aŭ, foje, multajn lingvojn. Estas malfacile mastrumi dudek kvar lingvojn, kiel en la Eŭropa parlamento, sed tio eblas. Uzi du aŭ tri estas tre facile, ĉar estas malmultaj kombinoj de lingvoj : de ĉiu lingvo oni nur bezonas interpreti aŭ traduki al la du aliaj. Nuntempe ĉiuj lingvoj en tiaj situacioj estas naciaj lingvoj. La angla estas la ĉefa kaj la plej kutima inter tiuj, sed la samo okazus kun aliaj naciaj lingvoj.

Kial do ne enkonduki pli neŭtralan kaj egalecan lingvon sen forigi la aliajn ? En instuticio kun unu aŭ du laborlingvoj, aldoni plian estus tute facile.

Oni nur devos traduki al tiu plia lingvo kaj el ĝi. Sed laŭ mi la efiko estus tute malsama ol la aldono de plia nacia lingvo. Kial ? Plia nacia lingvo donas plian rajton al la parolantoj de tiu lingvo. Neŭtrala lingvo permesus doni egalajn rajtojn.

Imagu, ke oni nun enkondukus Esperanton en internacia konferenco, kie kutime uziĝas nur unu nacia lingvo, kun interpretado inter ambaŭ. Ĉiuj tiuj, kiuj ne volus aŭ ne povus uzi la nacian lingvon, povus uzi la novan lingvon. La montro, ke neŭtrala pontlingvo funkcias, kuraĝigus aliajn partoprenantojn provi ĝin. Ili eble ankaŭ regus ĝin pli bone ol aliajn lingvojn pro ĝia facileco.

Aldono de relative facila neŭtrala pontlingvo en tiu internacia konferenco ankaŭ ne estus vidata same kiel aldono de plia nacia lingvo, ĉar la solvo aspektus klare pli bona laŭ kelkaj ecoj : lernofacileco, justeco, respekto al kulturoj. Kaj, se ial oni ne dezirus mem paroli tiun pontlingvon, estus eĉ pli facile lerni ĝin nur sufiĉe por povi kompreni ĝin. Ĉio tio montrus vojon al alispeca solvo de la lingva problemo.

Mi komparus tiun situacion al tiu de Linukso kaj de la la liberprogramara mondo ĝenerale : Linukso estas multe malpli uzata ol aliaj – komercaj – sistemoj kiel Vindozo. Oni povus demandi sin, kial oni uzu ĝin sur sia propra komputilo : ekzemple,



preskaŭ ĉiuj softvaroj funkcias ĉe Vindozo, kaj ne ĉe Linukso. Linukso ne estas la ĉefa, « norma » sistemo. Tamen sufiĉe da homoj uzas ĝin : ĝi estas tute senpaga, kun malferma kodo (kaj do modifebla), ĝi permesas funkciigi multajn liberajn (senpagajn) softvarojn. Ĝi ankaŭ respondas al idealo : ĉiuj povas elŝuti ĝin, dividi ĝin, ŝanĝi ĝin, ĝi funkcias facile ĉe sufiĉe malrapidaj komputiloj, ktp. Kaj, kompreneble kaj grave, ĝi ne estas produkto de profitcela firmao. Tamen la « fina venko » de Linukso ne alvenis. Ĝis nun ĝi restas afero de (tamen relative grava) malplimulto. Tamen pli kaj pli ne nur komputilaj nerdoj transiras al Linukso, ĉar la sistemo havas siajn proprajn avantaĝojn.

Mi pensas, ke, kiel por Esperanto, la « fina venko » ne nepras. Nur necesas, ke ĝi iĝu konata kiel unu ebla solvo (kaj ne nur « revo ») al la problemo de internacia komunikado, kaj ke ĝi estu uzata de homoj, kiuj estas nek nuraj lingvaj nerdoj nek nuraj idealistoj.

Eble plej grave, ĝi donas elekton : tiuj, kiuj pensas, ke plej bona lingvafrankao estu kaj facila kaj egaleca, homoj, kiuj celas pli realan internaciismon, povus uzi Esperanton. Ne plu estus nur unu solvo. Oni do ne devas celi iun finan venkon per enkonduko de la lingvo tra la Unuiĝintaj Nacioj aŭ simile, sed simple provi doni

elekton, kaj eduki homojn pri la malavantaĝoj de ununura kaj nacia pontlingvo. Tio iel okazas ekzemple en kelkaj retaj projektoj, en la Linuksa mondo (malsurprize), sed ankoraŭ ne en internaciaj institucioj, konferencoj, ktp. Homoj devas havi eblon uzi neŭtralan pontlingvon kiel Esperanto por tute ne-Esperantaj celoj.

Oni jam povas pensi pri grupoj, kiuj povus interesiĝi : liberprogramaremuloj, lingvemuloj, « alternativemuloj » (diverspecaj maldekstremuloj, vegetaranoj, ktp). Pro tio ni havis budon dum la pasintjara Monda Socia Forumo de Montrealo, kaj pro tio mi parolas pri Esperanto al la plurlingvemaj rondoj, en kiuj mi partoprenas. En plurlingvemulaj kongresoj, ŝajne la afero komenciĝas : mi scias, ke estis almenaŭ unu Esperantlingva prelego en la pasintjara Polyglot Gathering en Berlino. Mi scias, ke pluraj plurlingvemuloj aŭ nun lernas aŭ emas lerni la lingvon. Ankaŭ kursoj kiel tiu de Duolingo sufiĉe popularigas la lingvon.

Tiel mi do vidas la celon kaj agon de asocioj kiel ESK : eduki homojn pri lingva malegaleco, sciigi ilin pri Esperanto, laŭeble kuraĝigi aliajn grupojn uzi la lingvon, tiel ke la plej multaj homoj havu elekton pri maniero komuniki internacie. Nek raŭmismo, nek fina venko, Linukseco !

# Esperantistoj en nia medio

*Garry Evans*

*La nouvelle application Amikumu, pour tablettes et téléphones intelligents, permet d'entrer en contact avec d'autres espérantistes partout dans le monde. L'auteur discute de ses avantages et de ses inconvénients.*

Ĉu vi iam demandas vin, kiom da Esperantistoj loĝas en via ĉirkaŭaĵo ? Ĝis nun, tio tute ne scieblis. Supozeble, nur kelkaj el ili regule partoprenas kunvenojn de la loka Esperanta societo. Kredeble, estas multaj aliaj, ekzemple novbakitaj Esperantistoj, kiuj ĵus finis la Duolingan kurson, kiuj ankoraŭ ne aperis en esperantistaj rondoj.

Tamen tiu ĉi problemo estas nun, almenaŭ plejparte, solvita. Dank' al Amikumu, poŝtelefona aplikaĵo lanĉita en aprilo 2017, oni povas vidi la nomojn, ofte kun fotografiaĵo kaj biografieto, de la plej proksimaj 100 Esperantistoj. Mi supozas, ke devas esti nun nur malmultaj Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri Amikumu, tial mi ne detale priskribu ĝian funkciadon ĉi tie. Se vi ankoraŭ ne elŝutis la apon al via iPhone aŭ

Androida saĝtelefono, mi forte rekomendas, ke vi legu pri Amikumu ĉe [amikumu.net](http://amikumu.net) kaj elŝutu la apon kiel eble plej baldaŭ. Ĝi estas sendube unu el la plej utilaj iloj nun ekzistantaj, almenaŭ por sociemaj Esperantistoj.



Garry Evans

Verkante tiun ĉi artikolon sidante ĉe mia ĉehejma skribtablo en la urbocentro de Montrealo, mi vidas 26 esperantistojn ene de 20 kilometroj, kaj 15 aliajn en tiaj proksimaj urboj kiel Otavo, Kebeko kaj Burlington. Mi konas eble duonon de tiuj homoj, sed la aliajn tute ne. Mi sendu al ĉi tiuj (aparte al tiuj, kiuj sin priskribas kiel komencanton) mesaĝon por

reklami la Esperanto-Societon Kebekian kaj inviti ilin partopreni nian sekvan renkontiĝon.

Sed estas alia grava uzmaniero de Amikumu : por

vojaĝantoj. Mi ofte vojaĝas (almenaŭ po unu-du fojojn monate) pro mia laboro kiel ekonomikisto, vizitante klientojn en ĉiuj partoj de la mondo. En la unuaj dek unu monatoj de tiu ĉi jaro, mi jam vizitis dek sep landojn en ĉiu kontinento de la mondo krom Sudameriko kaj – ĉu ĝi estas kontinento ? – Antarkto.

Sed ne tro envidu min.

Dum tiuj vojaĝoj mi kutime vidas nur la internon de flughavenoj, hoteloj, kunvenejoj kaj taksioj. Mi tute ne havas tempon por ĝui la urbon, sperti la kulturon aŭ viziti vidindaĵojn, kiel emas fari turistoj. Mia nura plezuro estas kuri. Ellitiĝante frue antaŭ la komenco de la labortago, aŭ post tro multe da lacigaj kunvenoj, mi ŝatas kureti tra la stratoj. Tio estas bona maniero gustumi la lokan etoson, ekkoni iagrade la geografion de la urbo, kaj eĉ nur dum unu horo senti sin kvazaŭ kiel loĝanto de la loko.

Sed, post la ekesto de Amikumu, mi havas novan dumvojaĝan ŝatokupon : komunikadi kun Esperantistoj. Kiam mi atingas novan landon, la

unua afero, pri kiu mi okupiĝas, estas (eĉ antaŭ ol la aviadilo forlasas la alteriĝejon) ŝalti mian poŝtelefonon, malfermi Amikumu-n kaj kontroli, kiom da Esperantistoj estas en la ĉirkaŭaĵo.

Ege malsimilas laŭ la lando, kiom da ili estas. En Roterdamo mi rimarkis kelkdek (eble plejparte volontuloj kaj oficistoj en la Centra Oficejo de

UEA). La plej granda nombro, kiun mi iam ajn spertis fakte estis, kiam mi estis hejme kaj la Lingva Festivalo LangFest okazis en la apuda Universitato Concordia. Tiam mi vidis pli ol 30 Esperantistojn ene de 100 metroj. Mi supozas, ke dum la UK, Amikumu preskaŭ krevis pro tro da

uzantoj.

Male, kiam mi estis en Mezoriento kaj Azio mi povis vidi nur ege malmultajn Esperantistojn. Ekzemple, mi vojaĝis al Saud-Arabio en majo, kaj en Amikumu ne aperis eĉ unu Esperantisto loĝanta en tiu lando. La plej proksima samideano estis en Kuvajto, ĉirkaŭ 800 kilometrojn for. Mi sendis al li mesaĝon kaj li ŝajne ĝojis interkomuniki kun mi en Esperanto. Mi ankaŭ,



dum la sama vojaĝo, vizitis Honkongon, kie mi loĝis dum dek du jaroj ĝis 2015, kaj kie mi fakte eklernis Esperanton antaŭ kvar jaroj. Tiutempe mi tute ne povis trovi alian Esperantiston tie, kun kiu mi povis ekzerciĝi en la lingvo, kaj ne ekzistis loka esperanta societo. Tial, dum mia vojaĝo ĉi-jare mi antaŭĝojis ekscii, ĉu, per Amikumu, mi povos identigi

Esperantiston en mia iama hejmurbo. Fakte mi trovis du, kaj kun unu el ili mi interŝanĝis mesaĝojn, kaj promesis renkonti lin la venontan fojon, kiam mi estos en Honkongo.

Aliajn interesajn spertojn mi havis dank' al Amikumu. Kiam mi estis en la naskiĝurbo de mia edzino, mezgranda urbo en suda Japanio, por viziti mian malsanan bopatrinojn, mi povis partopreni la regulan renkontiĝon de la loka esperanta klubo. Mirinde estis por mi, ke en urbo de nur tricent mil loĝantoj en la japana kamparo ekzistis tia vigla movado. Cetere, ĉe la komenco

de tiu ĉi jaro (eĉ antaŭ la oficiala lanĉo de Amikumu – ĉar mi estis frua subtenanto de la aplikaĵo, mi rajtis uzi la beta-version), vizitante Aŭstralion, mi intermesaĝis kun Richard Delamore, la kunkreinto de Amikumu (kaj ankaŭ konata kiel la fama jutubisto Evildea).



Do, entute Amikumu estas amuza kaj utila ilo por ĉiuj Esperantistoj. Tamen mi havas kelkajn dubojn aŭ demandojn pri ĝia uzado. Unue, etiketo. Ĉu estas akcepteble sendi mesaĝon al iu ajn? Kelkfoje mi sendis mesaĝon al esperantoparolantoj

per Amikumu kaj, aŭ ne ricevis respondon, aŭ ricevis nur abruptan respondon. Ĉu oni rajtas proponi renkontiĝon? Eble ne, se la Amikumu-ano estas ĉarma juna virino, kaj vi estas, kiel mi, mezaĝa viro. En la nuna epoko de furoro pri seksa molestado kontraŭ virinoj, tia propono supozeble ne estas taŭga. Ankaŭ, kiel estas, kiam vi gastas en urbo, kiun ofte vizitas turistoj? Oni povas imagi, ke Esperantisto en ne ofte vizitata urbeto, kie

loĝas nur unu, du Esperantistoj, ege ĝojos, se iu kontaktas lin aŭ ŝin per Amikumu kaj proponas rekontiĝi. Sed eble ne en urbo kiel Novjorko aŭ Londono, kies loĝantoj estas ĉiam ege okupataj kaj jam havas sufiĉe da okazoj por uzi la internacian lingvon. Kiel pri Montrealo ? Mi volus pensi, ke ĉi tie ni estas sufiĉe malstreĉitaj kaj gastemaj, kaj tial ni ĉiam bonvenigus iun ajn, kiu kontaktus nin per Amikumu.

Mi ankaŭ havas kelkajn plendojn pri la aplikaĵo mem. Lastatempe la kreintoj plilarĝigis la uzadon al aliaj lingvoj ol Esperanto. Mi certe komprenas, ke la Esperantista mondo ne estas sufiĉe granda, por ke ili povu profiti nur de ĝi, kaj ke ili devas celi la lingvolernadan merkaton. Plue, mi komprenas, ke la ebleco, pere de la aplikaĵo, kontakti parolantojn de aliaj minoritataj lingvoj kiel la jida, la kimra aŭ la diversaj signolingvoj, estas tre fruktodona.

Tamen, laŭ mi, estas iomete domaĝe, ke Amikumu ne povos fariĝi universala platformo por komunikado inter Esperantistoj ie ajn en la mondo. Nuntempe, per Amikumu oni povas komuniki nur kun la plej proksimaj 100 parolantoj. Sed kiel mi faru, se mi volas sendi mesaĝon al mia amiko en Brazilo, sed ne konas lian retadreson ? Aŭ kiel estas, se mi planas viziton al Norvegio en

mez-decembro (kion fakte mi ja planas) kaj volas kontakti Esperantistojn tie por scii, ĉu ili havas aranĝon por festi la zamenhofan tagon ? Aŭ – kredeble pli tikla afero – supozu, ke UEA aŭ eĉ komerca firmao volas kontakti ĉiujn Esperantistojn por disvastigi informon aŭ reklamian servon...

Mi aŭdis lastatempe, ke la kreintoj de Amikumu intencas baldaŭ anonci novan etapon de ĝia disvolvado, kiu enhavos kelkajn tiajn plibonigojn, inkluzive « oran membrecon », kiu permesos al uzanto paganta (sed ne al tiuj, kiuj uzas la senpagan version), ekzemple, kontakti parolantojn ĉie en la mondo, kaj aliajn novajn uzmanierojn. Tion certe mi bonvenigos.

## Korespondamikoj serĉataj !

Granma Esperanto-Asocio (Kubo) serĉas korespondamikojn por interŝanĝi ideojn, kutimojn, vizitojn, kaj korespondi pri kiu ajn alia temo, kiun vi preferas. Bv. skribi al ni rete :

esperanto@crisol.cult.cu,  
cabrerae@nauta.cu kaj  
cabrerae@infomed.sld.cu  
aŭ poŝte : poŝtkesto 48



# MeKaRo 2018 : TRe agrabla TRivero !

*Suzano Roy*

*La prochaine rencontre MeKaRo, qui réunit chaque année, en mai, des espérantistes ontariens, québécois et américains, aura lieu du vendredi 18 au lundi 21 mai 2018 à Trois-Rivières.*

Kaj por ĉiuj, kiuj maltrafis MeKaRon en 2010, kaj ĉiuj, kiuj ja partoprenis ĝin sed volas reveni... okazos en 2018 MeKaRo (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto) en Tririvero. Ni havas rendezuon, mezvoje inter Montrealo kaj Kebekurbo, en la TRe agrabla kaj TRe gastama TRivero.

Temas pri historia urbo, la due plej antikva en Kanado. Tiu mezgranda urbo, kiu antaŭnelonge estis mondskala ĉefurbo de la paperindustrio, nun estas konata kiel « ĉefurbo de poezio ».

Nekredebla ŝanĝo, ĉu ne ? Ĝia situo, ĉe la kruciĝo de riverego Sankta-Laŭrenco kaj rivero (granda, eĉ sen la eg-sufikso) Sankta-Maŭrico, estis grava por la komerco de diversaj varoj, diversepoke. Nun, ĝi allogas multajn turistojn, pro siaj naturaj kaj kulturaj vidindaĵoj.

Dum MeKaRo, vi vizitos urbocentrajn domojn,

restoraciojn, muzeojn, preĝejojn kaj eĉ malliberejojn. Tiuj, kiuj preferas paŝi en naturo, povos elekti, anstataŭ muzeoj, viziton de riveroj, insuloj kaj eĉ plaĝoj ! Ĉiuj havos okazon elmontri siajn talentojn, dum konkurso de tradukado de poezio kaj dum vespero de tabloludoj.

Venu turismi, esperantumi kaj amikumi en Tririvero, inter vendredo la 18-a kaj lundo la 21-a de majo 2018. La oficiala programo komenciĝas sabaton posttagmeze, do la 19-an. Ĝi aperos baldaŭ en la retejo de ESK, kun aliĝilo kaj listo de konsilindaj hoteloj.

Tririveraj hoteletoj estas diversaj, proksimaj kaj ne tro multekostaj.

La urbo estas atingebla per aŭto aŭ buso, de Montrealo aŭ Kebekurbo.


# La ĵuro de Andreo Cseh

*Discours lors de la fête de fin d'année (Montréal, 16 décembre 2017)*

**Zamenhoftaga parolado (Montrealo, 16-an de decembro, 2017)**

***Francisko Lorrain***

Andreo Cseh [ĉe] estas tiu, kiu kreis la faman « Cseh-metodon » por instrui Esperanton. Dum la zamenhofa festo mi legis la ĉi-suban tre kortuŝan alineon el la biografio de Cseh verkita de Ed Borsboom, *Vivo de Andreo Cseh* (Hago, Internacia Esperanto-Instituto, 2003, p. 31). Ni estas en 1916, do dum la unua mondmilito. Andreo estas 20-jara. Li deziras pastriĝi kaj baldaŭ forvojaĝos al la seminario en Alba Julio. Momente, li daŭre loĝas kun sia familio en Puj, urbo hodiaŭ en okcidenta Rumanujo, sed tiam en la aŭstro-hungara imperio. Tie loĝas kaj rumanparolantoj kaj hungarparolantoj. Lia familio estas el la lastaj. Lia patro Otto Cseh zorgas pri la loka katastro [cadastre, cadaster]. La rumana armeo tiam komencas invadi la teritorion de la aŭstro-hungara imperio el la oriento. Ĝi antaŭeniras okcidenten kaj alproksimiĝas al Puj. Jen tio, kion



Andreo Cseh

Borsboom rakontas.

*Otto Cseh ricevis instrukcion enpaki la havaĵon de la katastro en Puj kaj foriri kun ĝi plus la familio al la urbo Arad [pli okcidente, hodiaŭ en Rumanujo].*

*Oni diponigis por tiu celo unu brutvagonon fervojan. Kaj rapide ĉio devis okazi. Ne estis tempo por okupi sin pri privataj posedaĵoj. Ili restis en la domo, fordonotaj al detruo kaj pere. Andreo, ĝuste ankoraŭ hejme, helpis la patron malplenigi kontoron kaj arĥivejon, kaj fine en la malluma nokto de la rifuĝo li momenton haltis inter la pakaĵoj en la vagono. Li meditis pri la absurda, iom surrealisma sceno. Fulmis tra lia kapo, ke vivi por atingi daŭran pacon estus sencoriĉa cela kaj ke la ne-forlasebla rimedo estu la disvastigo de la zamenhofa lingvo. Subite li metis du fingrojn supren kaj mallaŭte diris en Esperanto : « Mi ĵuras labori, mi ĵuras batali, por reunuigi la homaron. »*

## « Ankaŭ mi havas revon... »

*Discours lors de la fête de fin d'année (Montréal, 16 décembre 2017)*

**Zamenhoftaga parolado (Montrealo, 16-an de decembro, 2017)**

*Jacques Gaucher*

Ĉi-vespere estas granda okazo paroli pri Zamenhof. Lia vivo, lia lingvo kaj pri la Movado, tiel kiel ĝi ekzistas hodiaŭ.

Mi vere ne povos aldoni ion ajn, kion vi jam ne scias. Anstataŭe mi ŝatus paroli pri iu revo mia. Kiel D-ro Martin Luther King, ankaŭ mi havas revon. La sama revo, kiun Zamenhof havis, tio estas, ke la tuta homaro parolu Esperanton. Ĝis nun, tio ne estas, kaj mi ekpensas, ke neniam estos.

Ni gratulas vin instrui grupetojn da studentoj. Permesu, ke mi rakontu en kelkaj vortoj mian propran sperton.

En la jaroj kvindekaj, mi akcidente trafis la vorton « Esperanto » en la vortaro. Por mi tio estis grandega malkovro. Imagu : unu planedo, unu lingvo. Post diligenta serĉado, mi rapide trovis lernolibron kaj vortaron, kaj kune kun mia kara edzino ni lernis ĝin sufiĉe rapide. Por certiĝi, ke mi ne eraras, mi iris al Novjorko kaj revenis kun

atesto pri kapableco por instrui ĝin. Dank' al loka journalo *Le Soleil*, mi sukcesis trovi 25 gestudentojn en la unua jaro. Poste mi fondis monatan gazeton ne **pri** sed **en** Esperanto. Poste mi organizis la unuan kongreson en Kebeko, en kiu partoprenis eble 35-40 kongresanoj. Mi ne plu precize memoras.

Mi ĝojis pri tiu sukceso, kvankam ne sur granda skalo, sed samtempe mi ĉagrenis, ĉar mi konstatis, ke la homaro de la Tero, kiu nombras 7 450 000 000 personoj, neniam esperantistiĝos. Esperanto neniam estos internacia. Mi ekpensis, ke mi kaj helpantoj devas instrui pli grandskale. Kiel instrui al grandaj nombroj da personoj ? Mi konsciis, ke ni devas instrui ĝin pli agreseme. Instrui ĝin en la lernejoj. Ne plu al grupeto da personoj ĉiujare. Mi intencis kontakti la lernejan konsilion por ke ili permesu ke ni faru eksperimenton, en kiu du-tri klasoj de franca lernejo kaj du-tri klasoj de angla lernejo lernu Esperanton, kaj poste kunigi la klasojn antaŭ



atestantoj kaj dank' al tiu demonstro pruvi la valoron de tiu internacia lingvo. (Certe, tio implikas, ke le lernejoj devas helpi kun financo por aĉeti lernolibrojn kaj vortarojn.) La konsilio tiel povus konstati la facilecon kaj rapidecon de la lernado. Oni ne plu bezonus interpretistojn nek tradukistojn.

Antaŭ tia elokventa sukceso, necesus konvinki la

ministerion pri edukado stimuli la plivastigon de la Movado. Tio estis mia revo. Bedaŭrinde, mia kompanio translokigis min al Montrealo, kie mi fariĝis instruisto por ili. Ili sciis, ke mi ŝatas instrui.

Fine, hodiaŭ, mi estas 86-jara kaj ne plu havas la energion entrepreni tiun taskon. Sed se inter vi iu ĝin havas, mi proponas, ke oni kontaktu iun lernejon aŭ lernejan konsilion.

### **Bruno Beaudoin (1944—2017)**

Mi ekkonis Bruno Beaudoin somere 2017, tuj post la apero de la antaŭa *Riverego*, kiu anoncis la UK-on 2020 en Montrealo. Bruno skribis al ni dankinte nin pro *La Riverego* kaj informante ESK-on, ke li havas finan stadon de kancero... Mi estis tre tuŝita de tiu mesaĝo kaj, kompreneble, ekstreme ĉagrenita, ke li estas je la fino de sia vivo... Mi reskribis al Bruno, kaj dum tre (tro...) mallonga tempo ni estis korespondamikoj. Li loĝis en Donnacona kaj estis ĝoja, ke la UK-2020 okazos en Montrealo... kaj mi estis aparte tuŝita de tio. Li ja sciis, ke li ne povos partopreni la UK-on, sed tamen, li estis tiom ĝoja pri tiu okazo havi la plej grandan Esperanto-eventon en nia lando kaj en nia provinco... Restu en paco, grandanima Bruno, l'atypique...

**Ĵenja Amis**

### **Jefim Zajdman (1937—2017)**

En decembro 2017 mi perdis karan amikon : Jefim Zajdman (1937—2017), unu el le gigantoj de rusia kaj ukrainia Esperanto-Movado. Li kontribuis al *La Riverego* kaj estis konata de pluraj homoj en ESK, Kanado kaj tutmonde. Aŭtoro de plurdekoj da artikoloj, libroj kaj sennombraj tradukoj de kantoj kaj poemoj, aktiva en teatro, organizanto de sennombraj aranĝoj, lia energio ŝajnis neelĉerpebla, ĝis la fino. Jefimo mortis ne pro la aĝo aŭ malsanoj, sed pro la kolizio kun motorciklo kaj multaj seriozaj traŭmatoj... La kuracistoj de Jalto (Krimeo) batalis por lia vivo tutan nokton, sed ili ne sukcesis savi lin... Nun liaj amikoj preparas virtualan memorlibron por Jefimo. Se vi konis lin persone, bv. viziti la paĝon <http://tiny.cc/jefimo> kaj skribu tie viajn rememorojn.

**Ĵenja Amis**

# Kristnaskaj Rakontoj: “En neĝostormo”

*Louis Fréchette*

el la rakonto “En neĝostormo”, el Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado, Montrealo, Esperanto-Societo Kebekia, 2013, p. 48–49.

[...] ni reeniris la neĝveturilon, kaj, dum ni varme volvis nin en la “robojn” [t. e. en peltajn kovrilojn], la veturigisto vigle vipis siajn ĉevalojn, kiuj ĵetis sin antaŭen, nazbruante, tra la ventopelata neĝo.

La gastejestro ja pravis; post malpli ol horo, ni blinde antaŭeniris sur nevetureblaj vojoj, en plena mallumo, envolvataj en tia neĝhajla torento, kian neniu vidinta neniam la samon povas imagi. Ni supreniris perpendiklajn krutaĵojn, sur kies suproj niaj ĉevaloj apenaŭ povis stari kontraŭ la vento, kaj poste ni devis malsupreniri en faŭkantajn abismojn, flankatajn de gigantaj abioj, kie la kompatindaj bestoj preskaŭ malaperis en la kirliĝanta neĝo.

Kompreneble, ni ne povis iri pli rapide ol paŝon post paŝo; kaj, gvidate per nura instinkto, niaj ĉevaloj, lacegaj kaj blindigataj de algluiĝintaj hajleroj, pene plu stumblis kun pendaj kapoj, spiregante.

“Ĉu ni revenu malantaŭen?” mi demandis al la veturigisto. “Evidentas, ke ni apenaŭ povas plu antaŭeniri.”

“Malantaŭeniri!” ekkriis la kompatinda homo, kiu ŝajnis amare bedaŭri sian antaŭnelongan fanfaronadon; “estas tro malfrue, sinjoro; mi estas tiel blinda, kiel miaj ĉevaloj; se reveni malantaŭen, ni riskus maltrafi la vojon, kaj, kun la vojo maltrafita, mi ne donus kvin cendojn por niaj tri haŭtoj.”

La kuracisto nenion diris.

Nia situacio fariĝis senespera; ni povis nek malantaŭeniri, nek restadi en la sama loko, ĉar la vetero terure malplivarmiĝis, kaj, spite niajn dikajn peltojn, ni estis frostigitaj ĝis la ostoj. Ni povis nur antaŭeniri — ĉiuriske antaŭeniri. [...]

Aĉetu la libron en la retejo de Esperanto-Societo Kebekia : [www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)

Louis FRÉCHETTE

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de  
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA

**Atentigo** : Jaques Gaucher atentigis nin pri malĝustaĵo en la libro « Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado ». Sur la paĝo 23 ĝi mencias Vincent-on Beaupré kiel fondinton de Kebeka Esperanto-Klubo (KEK). Jacque Gaucher, fakte, estis ĝia fondinto kaj unua prezidanto.

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado : papere aŭ elektronike!

Ses kristnaskaj rakontoj de [Louis FRÉCHETTE](#) [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. 130 paĝoj, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo [Frederick Simpson COBURN](#) (1871–1960). Publikigis tiun esperantlingvan eldonon Esperanto-Societo Kebekia en 2013.

« [...] *la beleco, la facileco de la lingvaĵo, la sincera homamo, kiu elradias el la noveloj, faras el la libro de Fréchette idealan donacon – ne nur kristnaskan – al ĉiunivelaj esperantistoj.* » (Eugene de Zilah, La Gazeto, novembro 2014).

« *Aventuro, pioniroj, neĝostormoj, glaĉeroj, riveroj, situacioj en kiuj la naturo estas malamika kaj malgastama : jen la ĉefaj ingrediencoj de la ses rakontoj, ĉiuj tre ĝuidaj kaj engaĝaj.* » (Sara Spanò, Literatura Foiro, aŭgusto 2015).

Kristnaskaj Rakontoj estas ideala kristnaska donaco por viaj amikoj-esperantistoj, aŭ vi mem ! Aĉetu paperan aŭ elektronikan eldonon per la retejo de Esperanto-Societo Kebekia : [www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)

Papera eldono 24 CAD (kanadaj dolaroj) plus sendokostoj, elektronika eldono 14 CAD.

# Kvar hajkoj de Steven D. Brewer

*Minjo Renaud*

Mi legis tiujn hajkojn dum nia Zamenhofa festo-2017 en Montrealo. Ili estas el unu el la hajko-kolektoj de tiu aŭtoro, el tiu titolita *senokulvitre* (© 2013, pp. 81, 31, 58 kaj 69 respektive).

*malantaŭ nubon,  
la suno malaperas...  
vintro revenas*

*de l' altaj branĉoj  
la voĉon trovas la vent'...  
arboj respondas*

*senhaste falas  
la pacienco neĝo...  
grizo blankiĝas*

*nigre vestitaj  
apud la katedralo...  
senpekaj korvoj*



# Hajkoj aŭtunaj

*Normando Fleury*

Pinpingloj tere

Kiel tapiŝo estas

Komforto dube

Astero floras

Abelo aŭtungojas

Lasta mielo

Sidi surtrunke

Arbo giganta estis

Ripozo eblas

Filiko verdis

Jam ili tutvelkis

Filiko brunas

Pino altega

Branĉo laŭ horizonte

Al lumo iras

Verkita dum ARE 2017 (Aŭtuna  
Renkontiĝo de Esperanto, Silver  
Bay, NY)

# Aranefobio

*Suzano Roy*

*Suzanne affronte courageusement une araignée monstrueuse...*

Estis bela aŭtuna tago. Enirante mian oficejon, mi rigardis tra la fenestron por plenigi miajn okulojn per blua ĉielo antaŭ ol eklabori. Anstataŭe mia rigardo renkontis teruraĵon : monstran araneegon !!

Nu, bone, eble ne tiom danĝera, eble ne tiom ega... sed monstra por mi ! Ekde mia plej juna aĝo, mi malŝategas tiujn bestojn.

Dum la tuta mateno, mi provis forgesi pri ĝi. Mi ne volis rigardi tien, sed mia okulo iel ĉiam kaptis ĝian teruran bildon, ie, tie, atendantan min en la angulo... Ne ! Mi ne suferos tiel dum alia labortago. Mi devas fari ion. Sed kion ?


Ĉu mi petu helpon de mia sekretario ? Aŭ de kliento ? Ĉu mi voku mian eksedzon ?? Kuraĝon, Suzano ! Vi devas alfronti viajn timojn. Pli facile direble ol fareble. En miaj premsonĝoj, araneoj atakas kaj estas preskaŭ nemortigeblaj. Mi konscias, kompreneble, ke temas pri aranefobio. Tamen...

Tuj post foriro de mia lasta paciento, mi iris al librobreto por elekti taŭgan armilon. Sufiĉe malmolan. Sufiĉe dikan. Ne tro : mi ne volas rompi la vitron ! Pensante pri tiu ebleco, ke mi povus maltrafi ĝin kaj... Haltu ! Ne pensu pri tio. Vi ne maltrafos ĝin.

Libron enmane, mi eliris kaj ĉirkaŭiris la domon, kun rezoluteco en la okuloj. « Ĝi mortos, » mi pensis. Araneoj (nu, en miaj sonĝoj), krakante, kiam oni provas premmortigi ilin, aŭdigas neelteneblajn sonojn. Ĉar timigis min aŭditi tion, laŭta krio akompanis mian firman atakon. JJAAAAĤĤĤ !! kaj samtempe VLAM ! Jen. Mi venkis.

Koncentriĝante je mia celo, mi tute ne rigardis antaŭe, ĉu estas iu en la ĉirkaŭaĵo. Iom tremante post tiu grava venko, mi returnis min kaj vidis, starantan apude sur la trotuaro, ridetantan sinjoron, kiu diris : « Mi pensas, ke ĝi ja mortas ! »

Dum mi reeniris en mian oficejon, miaj vangoj ruĝis pro diversaj samtempaj emocioj : malpeziĝo, honto... sed ĉefe fiereco.



## Historiaj periodaĵoj rete traserĉeblaj

Ni ĝojas informi vin, ke la kompletaj tekstoj de la skanitaj periodaĵoj – pli ol 70 diversaj titoloj kun entute pli ol 900 jarkolektoj – estas sisteme traserĉeblaj laŭ unuopaj nocioj.

En la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko vi povas ne nur trarigardi nian havaĵon, sed pere de la retejo ANNO eĉ eblas sisteme traserĉi la jam ciferecigitajn periodaĵojn. ANNO (AustriaN Newspapers Online) estas la virtuala legsalono por la periodaĵoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

ANNO ebligas al vi entajpi serĉvorton en la kampoj “Text” (teksto) aŭ “Titel” (titolo), elekti unu el 17 lingvoj – inter ili Esperanto – kaj specifi la serĉon laŭ la eldonloko kaj eldonperiodo: [anno.onb.ac.at/anno-suche#searchMode=complex&from=1](http://anno.onb.ac.at/anno-suche#searchMode=complex&from=1)

Ekzemple, se vi entajpas en la kampo “teksto” la vorton “Zamenhof”, elektas kiel lingvon

“Esperanto” kaj alklakas “Suchen” (serĉi), vi ricevas 1913 rezultojn. Tio signifas, ke en 1913 numeroj de skanitaj Esperanto-periodaĵoj la nomo “Zamenhof” aperas almenaŭ unufoje.

Bernhard Tuidier



## Kiam, kie, kio okazas ?

La Internacia Kalendaro listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.



Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo ! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun dato, nomo, mallonga priskribo, reteja adreso, ktp !

Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage !

Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj

La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro *Eventoj* en Budapeŝto. La Kalendaro funkcias ekde 1996, kaj enhavas ĉiujare ĉ. 250 Esperanto-aranĝojn ! [www.eventoj.hu/kalendaro.htm](http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm)

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: Szilvási László, [szilvasi@eventoj.hu](mailto:szilvasi@eventoj.hu)

Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn !

# Esperanto-renkontiĝoj

19 — 21-a de majo 2018 : MeKaRo

Tririvero, QC

28-a de julio — 4-a de aŭgusto 2018 : UK

Lisbono, Portugalio

4 — 11-a de aŭgusto 2018 : IJK

Badaĥozo, Hispanio

6 — 8-a de oktobro 2018 : ARE

Silver Bay, NY

Somero 2019 : UK

Lahti, Finnlando

Somero 2020: UK

Montrealo, Kanado

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Ni renkontiĝas la duan kaj la lastan\* vendredon de la monato, vespere, krom dum la somero. La renkontiĝoj okazas en la restoracio Resto Végo (suba saloneto) : [1720 rue Saint-Denis](#), metroo « Berri-UQAM ». Manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Speciale por lernantoj, Suzanne Roy okazigas ludecajn paroligajn kursojn, inter la 18:00 kaj la 19:00 en la sama tago, en la kafejo La Récréation, 404 rue Ontario Est. Post la paroliga kurso la grupo pluiras al Resto Végo. Bonvolu kontroli nian horaron ĉe la retejo de ESK : [esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/](http://esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/) aŭ vizitu nian FB-paĝon : [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec). Kontrolu ilin ankaŭ por vidi la datojn de renkontiĝoj en Kebeko !

\* kutime la lasta vendredo estas la kvara vendredo de la monato, sed se estas kvin vendredoj en la monato, ni renkontiĝas la kvinan vendredon.

## Rencontres d'espéranto à Montréal

Les rencontres ont lieu les deuxième et dernier\* vendredis de chaque mois, sauf pendant la période estivale. Le lieu des rencontres est le Resto Végo (petit salon en bas) : [1720 rue Saint-Denis](#), métro Berri-UQAM. Souper à 18 h, discussions à partir de 19 h 30. Spécialement pour les apprenants, Suzanne Roy anime des cours de conversation ludiques, de 18 h à 19 h, le même jour, au café La Récréation, au [404 rue Ontario Est](#). Après le cours de conversation, le groupe rejoint celui du Resto Végo. Veuillez vérifier le calendrier sur le site de la SQE: <http://www.esperanto.qc.ca/fr/calendrier/> ou notre page FB: [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec) (pour Montréal ou Québec).

\* Le plus souvent, le dernier vendredi du mois est le quatrième, mais s'il y a cinq vendredis dans le mois, la rencontre a bien lieu le cinquième.



# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vic-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2018.3.20**  
**6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**  
**Visitez notre site web !**  
[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.